



Bulteno

de Esperantista Klubo en Prago

Ĉasopis Klubu esperantistů v Praze

N-ro 1/2021 (221)

16. 4. 2021

Unesko unuafoje faras enketon per Esperanto



Komence de tiu ĉi Bulteno ni publikigas la alvokon de UEA. Ĝi informas nin pri enketo, kiun okazigas la Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj por Edukado, Scienco kaj Kulturo (Unesko). La demandoj koncernas defiojn kaj celojn de edukado. Tio estas la unua enketo de Unesko, kiu estas en Esperanto. UEA petas ĉiujn esperantistojn partopreni por vidigi al Unesko la utilecon de Esperanto.

EL LA ENHAVO

Enketo de Unesko	3
Novaĵoj de KAVA-PECH (P. Chrdle)	4
Esperanto-biblioteko en Prago (J. Mařík)	6
Eseoj, konsideroj, interesaĵoj (M. Turková).....	10
Ŝercoj (M. Lebl, M. Tomečková)	17
Memoáry Benjamin Kurase (T. Břicháček)	22

O ĉasopisu

Evidenční číslo: MK ČR E22980
Vydavatel: Klub esperantistů v Praze
Sídlo: Jirečkova 5, Praha 7
Vychází třikrát ročně
Kontakt: t.brichacek@seznam.cz
Redaktor: Tomáš Břicháček
Korektury: Pavol Petřík

Forpasis Václav Lamr

Kun bedaŭro ni anoncas, ke la 17-an de decembro 2020 forpasis samideano Václav Lamr.

Václav Lamr naskiĝis la 25-an de aprilo 1943 en Litovel. Li estis ĉeĥa pentristo, esperantisto, poeto, kreanto de aforismoj. Li studis art-industrian lernejon en Brno, fakon „pentristaj teknikoj kaj pentraĵoj en arkitekturo“ (1961–1964). Antaŭ 1968, en la tempo de liberiĝo de pensado, li ekspoziciis kun juna generacio de artistoj kaj aranĝis vesperojn de propra poezio. Post 1970 la tiamaj okazintaĵoj en Ĉeĥoslovakio orientigis lin al la kristanaj valoroj, li komencis krei bildojn kaj grafikaĵojn kun bibliaj temoj (Reveno de la perdita filo, Kompatema patro, Kompatema samariano, Lukto de Jakobo kun anĝelo). Ekde 1993 li preparis lernantojn por studado en artfakoj, precipe pri desegnado de portretoj kaj homfiguroj. Li organizis „Tagojn de kreado“ por infanoj kaj junularo por motivigi talentajn individuojn trovi propran stilon de esprimado. Li ekspoziciis siajn bildojn en Ĉeĥio kaj ankaŭ eksterlande. Lia speciala hobbio estis kreado de aforismoj.

El la letero de Tomáš Břicháček al sinjorino Lamrová (24. 12. 2020):

„Vážená paní Lamrová, jménem svým i Klubu esperantistů v Praze bych Vám chtěl vyjádřit upřímnou soustrast.

Vašeho pana manžela jsem znal z jeho občasných návštěv v našem klubu. Nebyl v něm zvlášť hovorný, ale všichni jsme dobře věděli o jeho umělecké činnosti. Přispěl také loni na jaře do našeho časopisu krásnou básní o Janu Palachovi. Ještě letos před pandemií jsme se spolu domlouvali na přednášce o jeho obrazech. Bohužel na ni už nedošlo.

Vážil jsem si jeho výtvarného díla i jeho velmi aktivního křesťanského duchovního života.

Našemu klubu bude velmi chybět.“

Forpasis Lenka Angelová

Kun bedaŭro ni anoncas, ke la 18-an de marto 2021 forpasis nia amikino Lenka Angelová (62-jaraĝa). Ŝi estis longjara aktiva membrino de E-mental', tre bonkora virino, kiu zorgis pri aliuloj kaj ĝojigis homojn ĉirkaŭ si, nelacigebla persono, kiu dum multaj jaroj vigle laboris por Esperanto-mondo.

Lenka, vi tre mankos al ni!

Alvoko de UEA koncerne enketon de Unesko

La ĉefa celo de Unesko estas kontribui al paco kaj sekureco en la mondo per kunlaborado inter nacioj per edukado, scienco, kulturo kaj komunikado. Per tio oni antaŭenigas universalan respekton al justeco, al la regado de leĝo kaj al homaj rajtoj, fundamentaj liberecoj kaj toleremo, kiuj estas konfirmitaj por la popoloj de la mondo, sendepende de raso, sekso, lingvo, aŭ religio, laŭ la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj. Unesko ankaŭ kontribuas al daŭripova disvolviĝo kaj protektado de endanĝerigitaj lingvoj. Por evoluigi la realigon de la celoj, ekde 1971 ĝis 2015, Unesko trifoje publikigis serion de Tutmondaj Raportoj pri Edukado kaj planas publikigi la novan raporton *Futuroj de Edukado: Lerni fariĝi* (Futures of Education: Learning to Become) en novembro 2021.

Por vaste kolekti ideojn kaj bone prepari la tutmondan raporton, Unesko fondis Internacian Komisionon pri Futura Edukado kun 17 altrangaj fakuloj el diversaj landoj, estratan de s-ino Sahle-Work Zewde, la Prezidento de la Federacia Demokrata Respubliko Etiopio. Unesko publikigis 1-minutan enketilon en 17 lingvoj, inkluzive Esperanton danke al la iniciato kaj traduko de Renato Corsetti.

UEA traktas tion kiel ŝancon por esperantistoj esprimi siajn opiniojn en la tutmonda raporto pri edukado. Tio estos grava ago laŭ la strategiaj planoj disvastigi la idealojn kaj valorojn de Unesko per Esperanto kaj por vidigi al Unesko la utilecon de nia lingvo. Ju pli multaj esperantistoj plenigos la enketilon, des pli klare la lingva valoro estos videbla al Unesko. UEA do alvokas, ke ĉiu esperantisto investu unu minuton pleniĝi la facilan enketilon laŭ la indiko sur la retejo en.unesco.org/futuresofeducation/top-3-challenges-and-purposes-education/Esperanto aŭ mallonge:


bit.ly/enketounesko2021. Ĉiuj Esperanto-organizoj, grupoj kaj kluboj dissendu anoncojn por instigi esperantistojn partopreni. La enketado finiĝos en la **fino de aprilo**.

Por doni nian kontribuon kaj influon al la Tutmonda Raporto de Unesko, UEA planas speciale sendi al Unesko proponan raporton, laŭ la indikoj de Unesko: *kiel edukado povas esti uzata por formi la futurojn de la homaro kaj la planedo: kio devas esti memorata kaj kio devas esti akcentita pri ĉi tiuj du aferoj*. UEA invitas talentajn esperantistojn sendi siajn proponojn al la dua vicprezidanto de UEA, Trezoro Huang Yinbao trezoro@qq.com kaj al la ĉefrepresentanto de UEA ĉe Unesko François Lo Jacomo francois@lojacomoeu antaŭ la 20-a de aprilo 2021. La proponoj povas esti tre konkretaj aŭ ĝeneralaj. La fina propona raporto devas esti maksimume 1000 vortojn longa.

Atentu: Bonvolu nepre uzi komputilon por pleniĝi la demandaron, ĉar sur telefono foje ne aperas la fina butono „Sendu”.

Novajaĵoj de KAVA-PECH

Petr Chrdle



Pri ĉiuj novaĵoj de la eldonejo KAVA-PECH vi povas legi en la lasta numero de Starto, la organo de ĈEA. Sed mi volas nun iom pli proksime fokusiĝi al nur tiuj, kies aŭtoro aŭ tradukinto estas membroj de nia klubo.

La kvarlingva verko, *Kreslený humor / Desegnita humuro / Cartoon humour / Humor mit dem Zeichensstift*, elekto el la riĉa verkaro de la humoristo, karikaturisto kaj ilustristo Pavel Rak, aperis en la jaro 2009 okaze de la sepdekjariĝo de la aŭtoro. Ĉar ĝi estas longe ne plu havebla, mi proponis al Pavel, okaze de lia okdekjariĝo aperigi ĝian duan eldonon. Pavel konsentis, tamen volis iujn

desegnaĵojn anstataŭigi per novaj. Kompreneble mi akceptis tion, sed tio ne funkciis, ĉar venis pli kaj pli da novaj proponoj. Do mi ŝanĝis la opinion kaj ni decidis eldoni la verkon, kie estu konservita nur la formo, sed la enhavo estu komplete nova. Tial ne plu eblas ĝin nomi la dua eldono. Ni tamen konservis la titolon nur aldonante la numeron 2.

La preparo daŭris iom pli ol supozate, dume Pavel konfesis, ke li ne kapablas el la miloj da bildoj, kiujn li desegnis, elekti nur kelkajn. Nu, helpo estis proksime: la elekton faris lia edzino, do oni povas diri, ke temas pri la specimeno de la verkaro de Pavel, tamen laŭ la elekto de Marcela Raková. La verko finfine aperis, kvankam ne en la jubilea jaro de la aŭtoro, 2019, sed kun ioma prokrasto en januaro 2021.

Anstataŭ priskribi la enhavon, jen la listo de la ĉapitroj, laŭ kiuj eblas imagi la enhavon:

Antaŭparolo de la eldonisto

Pavel Rak (pri la aŭtoro)

Ĉe kuracisto

Erotiko

Ekologio

Filozofiaj opinioj


Desegnisto

Familio

Diversaĵoj


Ilustraĵoj por la eldonejo KAVA-PECH

Decas aldoni, ke la tradukojn, kiuj ĉe humuro estas ofte tre komplika kaj oni devas esti vere inventema, faris la plej kompetentaj tradukintoj: La ĉeĥajn akompanajn tekstojn esperantigis Miroslav Malovec, la angligon faris perfekta konanto kaj de Esperanto, kaj de la ĉeĥa Richard Howard havante je dispono kaj la originalon, kaj la tradukon de Mirek, kaj la germanigon prizorgis Sabine Fiedler, profesorino pri lingvistiko ĉe la universitato en Lepsiko havante je dispono kaj la Esperantan, kaj la anglan versiojn.



Cetere, ĵus aperis alpresio de la longe elĉerpita dua eldono de la komuna verko de Sabine Fiedler kaj Pavel Rak *Ilustrita Frazologio*, kiu certe estas juvelo inter didaktikaj manlibroj por progresintaj esperantistoj.

Plia novaĵo, kiun mi volas prezenti, estas en la ĉeĥa, ĝi konvenas ankaŭ por komencantoj, tial mi daŭrigas ĉeĥe.



První učebnice esperanta od jeho tvůrce Ludvíka Lazara Zamenhova, *Základ esperanta*, známý i v národních jazycích včetně češtiny jako *Fundamento*, byla v roce 1905 schválena prvním světovým esperantským kongresem jako nezměnitelný základ esperanta. Originál, plným názvem *Fundamento de Esperanto*, sestává kromě autorovy předmluvy ze tří částí: Pětijazyčná mluvnice (francouzsky, anglicky, německy, rusky, polsky), cvičení (jen v esperantu), a šestijazyčný universální slovník (esperanto + pět zmíněných jazyků). Český překlad Petra Chrdleho obsahuje předmluvu

L. L. Zamenhova, český překlad gramatiky a cvičebnici, neobsahuje slovník, je ale doplněn o komentáře překladatele a tři přílohy: Překlady ke cvičením, stručný popis úlohy Akademie esperanta pro vývoj esperanta a odkazy na internetové portály, kde je možno se blíže seznámit s esperantem, dění kolem něj, ale také kde se dají najít moderní bezplatné kurzy esperanta.

Pli da informoj pri ĉiuj libroj eldonitaj de KAVA-PECH oni trovas ĉe <https://kava-pech.cz>

Esperanto-biblioteko en Prago

Jaroslav Mařík¹

En Praha /Prago/ 26 jan. 1992

S-ro D-ro Arpád Mathé

Budapest

Estimata samideano!

La klubestrino f-ino Hubnová donis al mi vian leteron kun peto respondi al vi viajn demandojn pri la Esperanto-biblioteko en Prago, kies oficiala nomo estas „Esperanto-Biblioteko 'Jaroslav Šustr' de la Esperantista klubo en Praha“. Alie neni el la klubo, ĉar ĉiuj estas kelkjaraj novuloj, ne povus vin kontentigi.

La temo „Esperanto-biblioteko“ estas por mi, veterano de la Movado (de 1954), ne nur ĉiam interesa, sed ankaŭ afero de mia afliktiĝo, ĉar ĝi de la j. 1980 estas fermita, neuzata, kaj nun grave minacata estas ĝia ekzisto! La minacon kaŭzas unuavice la nuna mizera situacio financa, kaj duavice ankaŭ malintereso pri ĝi.

Mi skizos al vi la sorton de la praga biblioteko kaj vi tiel eble havos temon por pliriĉigi vian prelegon en la esperantologia konferenco ĉe la UK en Vieno 1992 pri la Esperanto-bibliotekoj de la mondo. Bonŝance mi havas la historion kaj evoluon de tiu biblioteko ĉemane (en 1990 mi, instigita de iu alvoko en la Radio, priskribis ĝian evoluon kaj staton al la Radio, esperante je eventuala helpo por ĝin savi. Sen respondo.)

La Esperantista Klubo en Praha (tia estas la oficiala nomo) estis fondita la 9-an de decembro 1902, do antaŭ 90 jaroj. En la jaro 1906 ĝia biblioteko havis 300 volumojn, kaj la klubo servis (dum tempo ne difinita) per sia „cirkula legejo por la membroj ekster-pragaj“ al la eksterurbanjoj. En 1939, kiam la lando estis okupita de la germanaj nazioj, la klubo aĉetis de la Esperanto-Asocio, posedanta librovendejon, librojn por 1 000 kronoj, kaj tiel la stato de la libraro altiĝis al preskaŭ 1 500 volumoj. En 1941, kiam la Asocio ricevis de la gestapo ordonon likvidi sin kaj grave reduktis la prezojn, la klubo aĉetis pluajn librojn. De tiu jaro la stato stagnis. Eĉ male, en la j. 1941–1948 senrevene perdiĝis 55 pruntitaj libroj (ekz. unu rara pri matematikaj sciencoj).

Pri la biblioteko zorgadis kaj ĝin kompletigadis la klubestro (dum 27 jaroj) kaj ĉefdelegito de UEA Jaroslav Šustr, komercisto, naskita en 1901. Kovajn librojn li sukcesis akiradi el la ekster-lando per intersanĝo, sed ĉefe per donacoj, ĉar pagi eksterlanden ne eblis.

En la jaro 1953 la libraro havis pli ol 1 500 katalogajn numerojn, en 1959 jam pli ol 4 000 volumojn, ĉar Šustr metis sian bibliotekon en la kluban.

¹ Transskribo de privata letero de Jaroslav Mařík al samideano Arpád Mathé

En 1967, per diligenta kompletigado fare de Ŝustr, la volum nombro altiĝis al 4 500; tiam ĝi jam troviĝis en akirita modesta ejo en la Týnská-strateto. Laŭ listo en marto 1967 ekzistis 4 696 enkatalogaj numeroj. La alkresko inter 1970 kaj 1975 estis 1102 volumoj. Kaj antaŭ la jaro 1980 la biblioteko atingis la finan nombron 6 100 (ses mil cent) katalog-numerojn, de libroj kaj binditaj jarkolektoj de gazetoj. Post Ŝustr, mortinta en 1969, fidinde zorgis pri la biblioteko s-ano Sainer kaj poste Zmeškal, kiu en kelkaj jaroj reordigis la libron (Ŝustr havis nur alkresko-liston) kaj pretigis ian novan katalogon. (Sed tiun mi neniam vidis, kaj en la nuna biblioteko, post la migradoj, ne estas trovebla).

Informon pri la fina stato en 1980, t.e. 6 100 volumoj, mi ĉerpas el la verko: Marinko Gjivoje, „Konsultlibro pri la Esperantaj bibliotekoj kaj muzeoj“, eldonita en 1980 en Zagrebo. La kontrolon kaj mezuradon mem en la biblioteko faris por Gjivoje s-ano Zdeněk Hršel el Brno. La indiko sur la paĝo 28 diras: proksimume 6 100 libroj, broŝuroj kaj binditaj jarkolektoj de E-gazetoj sur 85 metroj de bretlongo. Grava konstato troviĝas sur la paĝo 23: en la listo de „ASOCIAJ KAJ SOCIETAJ BIBLIOTEKOJ“ la “biblioteko de E-societo en Praha, Ĉeĥoslovakio“ atingas la trian lokon, laŭ la grandeco, en la mondo; antaŭiras ĝin la Butler-Libraro en Londono kaj la biblioteko „Hodler“ en Roterdamo. Post ili sekvas Pekino, Finnlando, Tokio kaj kvin ceteraj.

Tia estis la stato en la jaro 1980. De tiu tempo la Esperanto-biblioteko en Prago estas „m o r t a“, fermita, ne uzata.

* * *

Mi povis konstati ankaŭ iom pri la nombro de elpruntoj: antaŭ la jaro 1960 eĉ milo da legantoj pruntis librojn; el la jaro 1961 estis 517 pruntoj, en 1969: 158. En la jaroj 1980 ĝis 1991: ne ekzistas bibliotekisto, okazis neniun prunto. La klubestraro montris neniun interesiĝon pri la libraro, la pli malnova klubanaro formortis, kaj la nova evidente ne emas (aŭ ankoraŭ ne kapablas) legi librojn, havante, krom esceptoj, malaltan lingvo-nivelon kaj primovadan konscion.

Tiun situacion notis la belga vespera ĵurnalo „Dernière heure“ en Bruselo, el la 11-a de novembro 1982, en sia rubriko Lingvo kaj homoj, en artikolo pri la Esperanto-bibliotekoj en la mondo, indikante la staton de la praga biblioteko kiel bedaŭrigendan handikapon, ĉar ĝi dum jaroj ne povas plenumi sian kulturalan mision.

* * *

Eble estus interesa ankaŭ odisea migrado de la praga biblioteko: mi scias nur pri la stato en la kvardekaj jaroj. Ĝis la j. 1948 la libraro estis lokita en du grandaj enmuraj ŝrankoj en la kafejo Louvre, strato Národní, kie la klubo kunvenadis, kaj estante ne okulfrapa, povis tie resti dum la nazia okupacio ankaŭ post la deviga klubo-likvido, komprenebla „morta“,

neuzata. 1948 (venko de la komunista reĝimo): la kafejo nuligita, komenciĝis la odisea migrado de la libraro: lokita dum unu jaro apud kelo ĉe klubano Kutík; J. 1950; lokita en la oficejo de la renovigita Esperanto-Asocio, kiu tiam fine akiris du ĉambrojn de sia membro Balda, fariĝinta asocia oficisto, en la strato Malá Štěpánská 7; Balda zorgis pri la stato kaj pruntado. – 1952: pro likvido entrudita de la ministerio de internaj aferoj, la Asocio kaj la biblioteko devis forlasi siajn ejojn. Ankaŭ la Klubo likvidita, kaj la klubanoj fariĝis nura „interes-rondeto“ ĉe la urba kvartala Kleriga institucio Praha 1. Kaj tiu rifuzis, ke la rondeto posedu bibliotekon. Post serio de traktadoj kaj fina konsento de la institucio la klubo, por savi sian kulturen trezoron, akceptis proponon de Ŝustr vendi al li la libron kontraŭ simbola sumo 2 000 kronoj, kun la buŝa interkonsento, revendi ĝin al la klubo, se foje venos pli bonaj tempoj. Ŝustr transportis ĝin en sian loĝejon, str. Dlouhá 10. Kiu volis, povis elprunti libron.

– En tiu senesperiga situacio, antaŭ la vendo, estis ankaŭ proponite donaci la libron – tiam pli ol 1 500 volumojn – al la Ŝtata biblioteko de la Aŭstria Respubliko. Tio ne akceptita. – Tamen, post ĉ. 30 jaroj (verŝ. 1982), tiu aŭstria biblioteko fortransportis valoran bibliotekon de esperantisto Tichon en Bojkovice, kiu ne povis trovi por ĝi lokon en propra lando, antaŭ sia morto. –

Fine de la 50-aj jaroj (la jaron mi ne scias parkere): post penoj estis akirita (mirakleto) dekreto de la Nacia Komitato pri atribuo de unuejo de estinta triagrada vendejo, en la strateto Týnská ulička. La biblioteko, kun la endonacita privata libraro de Ŝustr, translokita tien. La ejo iom servis ankaŭ kiel deĵorejo.

J. 1969: mildiĝo de la politika situacio, starigo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, la klubo fariĝis ĝia baza loka organizaĵo kaj reaĉetis de Ŝustr, kiel promesite, kontraŭ tiuj 2 000 kronoj, la bibliotekon (kvankam la stato altiĝis de la ĉ. 1 500 al ĉ. 5 000 volumoj).

Jaroslav Ŝustr, kluba prezidanto dum 27 jaroj, pro sia por-esperanta agado ankaŭ post la likvido de la Asocio, tenita en j. 1959 tri monatojn en arestejo kaj severe enketata, estis savinta la bibliotekon kaj eĉ grave ĝin pliriĉigis. La tiama klubestraro (ankoraŭ ne mortintaj malnovaj membroj) atribuis en 1969 al la biblioteko, honore al ĝia zorganto kaj savinto, la honoran titolon „Biblioteko Jaroslav Ŝustr de la Esperantista Klubo en Praha“, kaj al li la titolon de honora membro.

En 1969: la Nacia Komitato forprenis al la Klubo la menciitan ejon kaj kompanse donis alian, iom pli grandan, en la strato Jilská n-ro 10, denove en Prago 1, do en la urbocentro, en domo, kiu ekzistis longe antaŭ la malkovro de Ameriko. Do nova transportado. Pri la libraro zorgis s-ano Sainer, asocia oficisto, kaj post li libervole, sed konsciencie, s-ano Zmeškal, ĝis ĉ. 1979. – En 1970 la refondita Asocio okupis la ejon por sia

sekretariejo (ne havante alian eblecon) oni deĵoris inter la libroŝrankoj, la ejo servis al du celoj.

En ĉ. 1987 la tiama klubestrino (Ŝ.), konsiderante la bibliotekon neutila balasto, „historiaĵo“, kaj vortoj „Esperantajn librojn ja neniu legas“, kun formala konsento de kluba jarkunveno, transigis la bibliotekon en posedon de la Asocio. (Tiutempe la libraro estis plu en la ejo komuna kun la Asocio).

J. 1990: post la t. n. velura revolucio en 1989 kaj forigo de la komunista reĝimo, la lupagoj por neluĝejaj ejoj ege plialtiĝis, proks. je 800 ĝis 1 000 %, ne povante tion pagi la Asocio disponigis unu el la du ĉambroj (la dua akirita en ĉ. 1972), al vojaĝagentejo, kiu devus pagi la tutan jaran lupagon. – La klubo, kiu tiutempe havis je sia dispono du ejojn en la strato Vejvodova 1 (ankaŭ en domo mezepoka), devis repreni la bibliotekon, kaj la libraro transportita en multaj skatoloj. (Tiel estiĝis malordo en la libraro).

Sed ankaŭ la klubo pro financa premego devis lui unu el la ĉambroj al alia vojaĝagentejo, kaj al la klubo restas kunvenadi en tra malgranda spaco inter la libroŝrankoj. – Do la klubo decidis fortransporti la bibliotekon en kelon de dometo de s-ano Václav Štěpánek, en la antaŭurbo Jižní Město (Suda urbo), kun la neceso atendi ĝis tiu kelo post penetro de akvo sekiĝos. (Por mi, la subskribinto, teruriga penso). Mi devas aprezi la klopodon de Štěpánek, kiu ankaŭ mem transportis la libraron en la straton Vejvodova, sed tie ĝi kuŝas en ŝrankoj senorde, kaj ne eblas trovi libron, se ĝi estus dezirata. Evidenteco pri la stato ne plu ekzistas. Katalogo ne estas, kaj la restinta sliparo ne plu estas fidinda.

Nun mi aŭdis „duonvortan“ diron de la funkcia klubestrino (Hubnová), ke tiu kelo ne plu estas aktuala; sed konkrete mi scias ĝis hodiaŭ nenion. (Mi, konata ankaŭ kiel kritikanto, estas laŭeble evitata). Sed ne estas tute certe, ĉu la Asocio kaj la klubo eltenos transvivi la ekonomian mizeron kaj ne devos forlasi siajn deĵorejojn. La bibliotekon akceptus neniu institucio, la kultura ne plu (ankaŭ ne la Asocio) ricevas subvenciojn. Kaj en la normalaj bibliotekoj oni ĉiujare, pro manko de loko, elvicigas ĉ. 10 % de libroj, precipe malnovaj, kaj post 10 jaroj el la Esperanto-biblioteko tiukaze restus verŝajne nenio. Estas konate, ke en keloj de la Ŝtata biblioteko estas ŝranko kun miloj da libroj.

Se tamen la biblioteko devus esti lokita en la menciita kelo, ĝia ekzisto estus mortriska; ĝi plu estus „morta“ libraro, krome minacata de eventuala nova akvo-penetro, aŭ eĉ morto de unu el la geedza paro (afabla, bonkora) povus sekvigii postulon de eble heredonto tuj forigi la bibliotekon... Pli ŝate ne finpensi... Fajrero de espero estas la dua menciita varianto de la klubestrino, kiu organiz-flanke estas vere lerta kaj ŝatinda.

DO TIO ESTAS LA SITUACIO KAJ FATALO DE LA ESPERANTO-BIBLIOTEKO „JAROSLAV ŠUSTR“ en Prago, en 1980 la tria plej granda societa en la mondo, sed jam 12 jarojn kvazaŭ morta.

Je via demando: daŭre ekzistas bibliotekisto; ekzistas sliparo, sed „laŭtemaj listoj“ de vi menditaj, estas ne troveblaj. Via demando pri „nekompletaj jarkolektoj de periodaĵoj“: ne respondebla. Periodaĵa katalogo; ne ekzistas. La hazarde venantaj, die, periodaĵoj (malmultaj) ne estas stokataj, sed disdonataj de la klubestrino al interesiĝantoj. – Via listo pri „Verda familio“: vidu en la akompana letero. – FONTOJ de tiu ĉi traktato: Gvidlibro Praha 1908; gaz. Ligilo, 1939, 6; gaz. Esperantista, Praha, 1950, 6. Memorando de Šustr, 11.11.59; plus lia cirkulero sendata. laborkunvena protokolo 24.3.69; gaz. Neděle, 1968, 2; jarkunveno 1975 (Zmeškal); Gjivoje: la menciita konsultlibro.

Eseoj, konsideroj, interesaĵoj

Margit Turková

I. Pano nia ĉiutaga

Eseo pri la „komodito“, kiu ĉiutage troviĝas en milionoj da buŝoj ĉiumonde; ĉu (nur) en preĝo-formo, ĉu (nur) en materia formo, aŭ ĉu en la ambaŭ formoj...

Kiu el ni eĉ pripensas, de kie „fontas“ nia ĉiutaga manĝaĵo...

Ja oni devas „profundiĝi“ en pratempan historion de la homaro; kiel faras la sciencistoj – orientalistoj.

Min instigis jena: la ĉeĥa orientalista (asiriologo) **Bedřich Hrozný**, kiam mi, en la jaro 2019, vizitis la „Muzeum Bedřicha Hrozného“ en lia naskiĝurbo Lysá nad Labem. Tie mi legis lian eldiron:

„Asiriologio, malgraŭ bonaj sukcesoj, havas mankojn, de kiuj la plej grava mi opinias, ke oni ĝis nun precipe okupiĝis plej intense pri historiaĵoj politikaj, pri spirit-kulturo, pri literaturo, pri religio kaj mitologio – dum multaj demandoj koncerne la ekonomian kulturon de tiuj praantikvaj landoj restis netuŝitaj. Kaj estas ekster la diskuto, ke ne nur la spiritkulturo, sed ankaŭ la materiaj trezoroj de Babilonio (unu el la plej kulturaj landoj) havas por homara historio la valoron plej altan...!“

Pro tio mia eseo koncernu la temon eksplikitan en la titolo...

Onidire la plej gravaj malkovraĵoj koncernas la plej valoran „produkt-rimedon“ – **la agri-grundon...**

La suno, kaj la akvo de la du riveregoj – Eŭfrato kaj Tigrido, kiuj ĉiujare pere de inundoj alprenadis tavolon de fekunda humo, estis la ĉefaj kondiĉoj por la agrikulturado. Precipe pri la akvo oni devis prizorgi ekstreme, ĉar da

pluvo estis malmulte. Tial oni konstruis kanalojn, digojn, digno-haltilojn, pumpilojn kaj aliajn helpilojn; kaj ilin senĉese prizorgi – larĝigi, purigi k.s. Tiu laboro bezonis tre bone organizitan agadon de ĉiuj komun-loĝantoj.

Tiaj estis la kondiĉoj por alte profitdona produktado de manĝo-produktoj.

Rimarko no. 1: por ni („lingvistoj“) estas interese, ke la ĉefa ŝtata zorganto (= zorgisto) pri tio en la sumera lingvo nomiĝis „agri“...

Rimarko no. 2: „komodito“ (ne estas en PIV - ankoraŭ) koncernas la produktadon de la varo, kiu estas destinita por komercado, negocado... do, la hejme bakita pano tia produkto ne estas...

La malkovroj de karboniĝintaj greno-spikoj en la areoj de Sirio, Turkio kaj „apudaj“ regionoj montras la komencon de agrikulturado (de agrokulturado precipe). De ili oni ekscias, ke la tiamaj nacioj havis je dispono nur „naturajn „grenoplantojn“, la kulturado de ili daŭris kelkajn jarmilojn – montriĝas, ke 8 000 (eble eĉ 10 000).

La tritiko estas nun la dua plej grava produkto produktata en la mondo (la unua loko apartenas al maizo, la tria al rizo). Ĉiu loĝanto de nia planedo foruzas jare 101 kg da ĝi.

El la tritik-grajno oni produktas farunon, gri(et)on, semolon kaj amelon; nutriĝas per ĝi la hejm-bestaro; el fermentita fariĝas alkoholo...

Rimarko no. 3: La limo-punkto estis, kiam (naturvoje, hibridomaniere, hazarde?) kulturiĝis du ĉefaj formoj denedisfaligemaj spikoj – el la disfaligemaj. Tiu lasta estas la primitiva *Triticum spelta* (ĉeĥe ŝpalda), al kiu oni denove redirektas sian atenton, opiniante ĝin pli taŭga por sanstato.

II. Eseo pri arĥivado

Paŝ(ego) post paŝ(eto) proksimiĝas la tempo, kiam ĉiu literatur-kreanto konsciiĝas, ke oni devas siajn kreaĵojn – ĉu valorajn, ĉu informajn – deponi en iu alia spac-ejo ol estas onies propra loĝejo; malplenigi ĝin de la verkaĵoj, kiujn amasigis tie aŭ la propra kreemo, aŭ la kolektemo. Ni tiamaniere adiaŭas nian longan vivepokon. Kun bedaŭro. Sed devas tiel esti: oni devas la kreaĵojn konservi por niaj posteuloj (kaj por esploristoj); nur la estonteco montros, kiuj estas „juvel-aĵoj“ kaj kiuj nur „paper-aĉoj.“

Ekstaras la pragmata demando: kie tion deponi?

Ja ekzistas grandaj institucioj en nia respubliko destinitaj por tiuj aferoj. Ekzemple miajn materialojn mi forveturigis en **Památník národního písemnictví, Praha** (La deponejo por nacia literaturo, Prago). La menciita institucio ne estas sola en nia respubliko. Por „moravanoj“ ekzistas la same grava deponejo – **Památník písemnictví na Moravě**. La instituto havas sian informilon, kiu nomiĝas LITERKA (koncerne „literojn“), kies redaktoro estas Libor Kalina. Kaj same, kiel en Prago, ankaŭ la moraviaj esperantistoj estas tie akceptataj afable kaj serioze.

Jen la intervjuo de Libor Kalina kun Miroslav Malovec, kiu estis publikigita en LITERKA 1/2021:

✂ **En la ekspozicio pri František Kožík** (*rim.: la verkisto F.K. estis ankaŭ esperantisto, M.T.*), **kiu ĵus videblas en nia instituto** (*rim: en Rajhrad, M.T.*) **oni povas konatiĝi ankaŭ kun liaj literaturaj verkoj tradukitaj en Esperanton. Vi – kiel estro de esperantistoj en Brno – dediĉas vin ankaŭ al tradukado. Ĉu vi povas diri, kiujn tradukaĵojn vi havas en via „portfolio“ ?**

Doktoro Johano Faŭsto (por la pupteatro ĜOJO); el la libro de Kožík pri Komenio *Lumo en tenebroj (Světlo v temnotách)* mi tradukis la duan parton de la verko (la romanon kiel tuton tradukis Zdeněk Rusín); kun Jiří Patera ni tradukis novelojn de Jaroslav Hašek (Sub la Esperanta titolo: *Ne nur la soldato Švejk (Nejen voják Švejk)*...

La interretajn paĝojn el *la gazeto VEDEM* (pri la judaj infanoj en Terezín); la operon *Sternenhoch* de Ivan Acher (laŭ Ladislav Klíma) cele al prezentado en la Nacia teatro en Prago; la poemvolumeton *Ekaŭdi la animon (Uslyšet duši)* de la poetino Věra Ludíková (komuna traduko mia kaj de Jaroslav Mráz). Pasintjare printempe mi tradukis *Hrátky s čertem* de Jan Drda por la studenta teatrogrupo DOMA de la gimnazio en Svitavy, aŭtune la fabelojn de Gabriela Kopcová *Vesmírničky* kaj la verketon *Desegnitaj humuraĵoj* de Pavel Rak.

De la mala flanko – el Esperanto en la ĉeĥan – mi tradukis en la jaro 1996 *Nový realismus* de Bruno Vogelmann (kunlabore kun Václav Pecák). Kaj en la jaro 2004 la libron de Detlev Blanke: *Interlingvistika – cesty k odborné literatuře*. Mi prilaboris la lernolibron *Gramatiko de Esperanto* (1988) kajkun Karel Kraft kaj kolektivo, *Esperanta-ĉeĥa vortaro/Ĉeĥa-esperanta vortaro* (1998). Kaj en la jaro 2017 *Velký esperantsko-český slovník*. (Ĉiuj estis eldonitaj en la KAVA-PECH-eldonejo). Sed mi ĉefe okupiĝas pri ciferigado de aliaj verkistoj, de ilia verkaro. Kaj mi estas ankaŭ jam 30 jarojn redaktoro de la Esperanta bulteno „STARTO“ (4 numerojn jare, cca 32-paĝa presaĵo).

Pri kio vi aktuale laboras kaj kion vi kreas nuntempe?

Mi preparas la eldonon de la Ĉeĥa-esperanta vortaro (nun mi nur atendas fakajn rimarkojn de Zdeněk Pluhař) kaj samtempe prilaboras la manuskriptojn de jam ne vivantaj esperantistoj (beletrojn, faktografiojn) por nia Esperanta interreta arĥivo; por venontaj generacioj.

Sub la titolo *Paměť českého esperantského hnutí* mi havas en mia komputilo ĉirkaŭ 500 elstaraj esperantistoj kaj mi daŭrigas en la afero. Iam ilia verkaro estas en manuskriptoj, iam disipita en diversaj gazetoj, revuoj (poemoj, rakontoj). Ĉi tie ni substreku, ke kelkaj el ili (t.e. ciferigitaj) estis eĉ eldonitaj: *Máj* (Majo) de K. H. Mácha, *Vlastní životopis Karla IV.*

(La biografio de Karlo la IV – el lia propra mano), Válka s mloky (Milito kontraŭ salamandroj) de K. Čapek, poemoj de Otokar Březina ktp. Krome mi en Esperanton tradukas la interretan programon „Prestashop“. Nun mi estas en preparstato de la romano Na dolinách svítá de František Kožík, ĉar Josef Vondroušek (kiu forpasis) jam ne sukcesis tion fini. En mia loĝejo troviĝas kelkaj „bananskatoloj“ de manuskriptoj atendantaj je prilaboro antaŭ ol mi ilin deponigos en nia Esperanto-muzeo en Svitavy. Tio ja daŭros jarojn...

Kion por vi persone signifas Esperanto kaj kian uzeblon ĝi havas en nuna tempo?

Mi okupiĝas pri ĝi jam pli multe ol 50 jarojn kaj mi diras, ke ĝi estas mia „tria kultura kontinento.“ La unua kaj la dua estas la literaturo ĉeĥa kaj la literaturo tutmonda; el la nacia mi konas centojn da nomoj, kontraŭe el la dana aŭ islanda – mi konas nur kelkajn. Esperanton mi regas ne nur kiel lingvon, sed mi konas bone ankaŭ ĝian historion, institutojn, personulojn, literaturon, kongresojn ktp. Do ankaŭ centoj da nomoj kaj faktoj. Nia biblioteko, kiun mi prizorgas, havas 5 000 titolojn. Eble vi scias, ke mi fondis la ĉeĥan Vikipedion (2002) sed mi dediĉas min ĉefe al la Vikipedio Esperanta, kio por mi estas „vidigo“ (pruvo) de la menciita tria kontinento. En ĝi partoprenadas esperantistoj el la tuta mondo (pri siaj kreaĵoj, pri diversaj gravaj personoj, pri belaĵoj de sia lando, pri informoj en diversaj fakaj areoj ktp.). Tial nia kolektiva verko-amaso havas jam 300 000 artikolojn. Fremdajn lingvojn oni lernas plejparte por gajni kaj havi informojn. Tial mi volas, ke Esperanto estu ankaŭ unu el informo-fontoj. Ne ĉiu regas la anglan aŭ la germanan aŭ la francan; kaj se nia Esperanta lingvo jam ekzistas – ĝi estu uzebla kaj utila al la homaro, al la homoj servu la granda laboro, kiun niaj antaŭuloj faris en la pasintaj jarcentoj. Ĝi enhavas eble eĉ milionojn da nevideblaj laborhoroj. Kompreneble, ke aliaj esperantistoj korespondadas reciproke kaj vojaĝadas, ĉiu laŭ sia emo kaj eblo.

III. Omaĝe al traktoro

„En 2021 Nord-Irlando estas centjaraĝa, do la jaro 2021 estas bona okazo listigi kaj estimi la atingojn de niaj famuloj“ – diras la aŭtorino Lorna V. Flanagan en la artikolo, kiun en la februara revuo ESPERANTO de UEA aperigis la redakcio, cele omaĝi kelkajn elstarulojn de sia patrolando...

Ĉar ni ne ĉesas esperi pri nia vizito en la lando, okaze de UK en Belfasto, ni faru same kiel ŝi, kaj ne ĉesu memori la landon al ni ankoraŭ nekonatan. El kelkaj irlandaj famaj inĝenieroj mi elektis almenaŭ unu. Pro tio, ke li okupiĝis en la profesio kiel mi mem (en agrikulturado) kaj kies invento

multe plibonigis la kondiĉojn „sur la kampo“ koncerna – ĝuste laŭlitere. Jen...

Harry Ferguson (1884-1960) Kiam Harry Ferguson estis infano, li loĝis en la malgranda farmo de sia familio en la graflando County Down. Traktoroj en tiu epoko estis pezaj kaj danĝeraj, kaj plugilojn oni devis tiri malstabile malantaŭ ili.

En la 20-aj jaroj Ferguson plibonigis la metodon ligi unu al la alia, konektante ilin sekure en tri loketoj, por ke la traktoro kaj la plugilo fariĝu unu tuto. Ĉi tiu sistemo estas pli sekura kaj faras pli bonan sulkadon en la grundo. Ĉi tiu tri-loka ligilo revoluciis la kultivadon. Hodiaŭ pli ol 85 % de la traktoroj en la mondo uzas la sistemon de Ferguson.

Lia celo estis pligrandigi manĝaĵo-produktadon. Kiel Jonathan Swift diris: „La viro, kiu povas kreskigi du maizplantojn anstataŭ unu faras multe pli da bono en la mondo ol tuta klaso da politikistoj.”

Tiom pri la sukceso irlanda. Sed – ĉu ni, nacilandanoj ne havas ion por fieri? Ni havas – kaj hazarde pri la sama „artefakto“...

✂ *Zetory vyjždějí do světa už tři čtvrtě století*

Jako téměř čtyřkolový kult byl veleben hned od počátku, kdy sjel z výrobní linky v brněnské čtvrti Líšeň. Má své muzeum a jmenuje se po něm i hospoda. Dokonce se o něm zpívaly i písničky. Zřejmě nejznámější skladbou je „Jede traktor je to Zetor“ od kapely Visací zámek.

Traktory Zetor letos vstupují již do 75. roku své existence. Navzdory faktu, že vývojové práce na prvním „prototypu Z“ začaly ihned po skončení druhé světové války, za rok vzniku je považován rok 1946, konkrétně srpen, kdy byla pro značku „Zetor“ oficiálně vydána ochranná známka.

První traktory Z 25, mimochodem v současnosti mezi sběrateli nejvzácnější, zaměřily k zákazníkům už o pět měsíců dříve. Zetor od počátku své existence vyrobil více než 1,3 milionu traktorů. Převážná většina z nich byla exportována do 130 zemí na pět kontinentů.

Nabídka traktorů pro evropské a severoamerické trhy zahrnuje osm modelových řad od 20 do 170 koní.

V současnosti dělá v Brně traktory 450 lidí, kteří předloni vyrobili téměř 1700 strojů. Loňská produkce je přibližně stejná. Podle výkonného ředitele Zetor Traktors, a.s., Mariána Lipovského se traktory staly synonymem pro účelné provedení a provozní efektivitu.

„Naše traktory vždy reflektovaly požadavky doby. Troufám si říci, že každý, kdo byl nebo je se značkou nějak spjatý – ať už jako zákazník, fanoušek nebo zaměstnanec firmy se cítí být její

součástí. Značka Zetor je vystavěna na úsilí a snaze široké skupiny lidí několika generací. Je pro nás odkazem a my k ní přistupujeme s úctou a hrdostí,“ zdůrazňuje Lipovský.

„Období posledních dvou let bylo značně ovlivněno aktuálním vývojem na trzích, který stále není optimální. Situaci nepřispěla ani epidemiologická opatření přijatá po celém světě.

Tuto perspektivu ale vyvažuje fakt, že si značka Zetor stále drží prvenství ve svém výkonovém segmentu na domácí půdě – v Česku, a druhé místo zaujímá na Slovensku. Stabilní prvenství si značka drží v pásu zemí Pobaltí, střední Evropy, Balkánu a Skandinávie. Radost nám dělají trhy s rostoucím potenciálem, jako jsou například Spojené státy, Velká Británie, Německo nebo Bosna a Hercegovina,“ říká Petr Konšťacký, ředitel úseku prodeje a marketingu.

V posledních letech značka vstoupila i na nové trhy, jako jsou Keňa, Etiopie, Súdán, Rwanda, Myanmar, Indonésie, Jemen, Kolumbie, Kostarika, Uruguay či Vietnam.

(Miroslav Homola, PRÁVO, 20. leden 2021)

IV. Manifestoj de la Vivo²

Estas malfacile priskribi la nepriskribeblan. Por ties celo ni uzadas la vortojn de komparado kaj alegorio. La Vorto estas tre forta ilo.

Se ni akceptas, ke la universo (en ĝi la Vivo) estas trapenetrita de nekaptebla forto simila al la penso (ideo), kies manifestojn ni kumulas en la termino „Dio“, ni devas plue ankaŭ akcepti, ke la komunikado kun la dio-forto, aŭ pere de ĝi, estas unu el la demonstroj de la Vivo. Apud la jam konataj kategorioj de komunikado ni intuicie antaŭscias la ekziston de iu formo, kiu estas ekster niaj sensoj. Pli proksime estas eble esploristoj, kiuj okupiĝas pri la „parol-eblo de plantoj“. Ni ankaŭ jam scias, ke bestoj reagis maltrankvile al alproksimiĝanta tertremo. Oni atribuas tion al ilia sentemo je la ŝanĝoj de geomagneta kampo.

Ĉu ankaŭ ni, homoj, estas kapablaj je simila perceptado, aŭ ĉu ni la kapablecon tute perdis? Ĉu ni povas kompreni la „kondukon“ de plantoj? Kiel reagis la vegetala regno al la minaco de tertremo, inundo aŭ incendio? Estis konstatite, ke la plantoj sur la esplor-aparatoj abrupte reagis jam en la momento, kiam oni nur pripensas deŝiri aŭ bruligi eĉ parton de ties folieto. Tio estis jam reale pruvita; kaj ne nur tio... Oni scias ankaŭ pri la kapableco de plantoj komuniki inter si reciproke, eĉ kun la homo. Bedaŭrinde, ĝis nun tio estaskomunikado nur unudirekta...

La plantoj reagis je ideo-instigoj. La planto, kun kiu vi „enamikiĝas“ estas kapabla (pere de plifortig-aparatoj) estingi kaj malestingi lumon en via domo. Sufiĉas pri tio nur pensi. Neniu scias, kiel rapide kaj kiom distance

² La fonto: Wojnar J.: UFO, bible a konec světa, Votobia 1997

transpreniĝas informo inter homo kaj planto. Precipe – pere de kio!! La kontakto funkcias ankaŭ tiam, se oni la planton lokas en la Faraday-kaĝo, kiu (kiel ni lernis en fiziko) ebligas trapenetri al neniu elektromagneta radiado.

Estas ankaŭ pruvite, ke la planto, kun kiu oni parolas kaj direktas sian intereson prosperas pli bone ol... En Findhorn (Skotlando) troviĝas malgranda agrikultura farmo, kiu al siaj plantoj (floroj, vegetaĵoj) dediĉas sian intereson same kiel al vivantaj estaĵoj. La rezultoj estas nekredeblaj – koncerne la geografian (kaj geologian) situon de la lando. Ĉu plantoj bezonas „personan“ kontakton? Ĉu ili havas sian psikologion? Ĉi tie regas nemezureblaj fortoj, pri kiuj ni scias nenion...

Ĉu ekzistas ia komuna formo de komunikado al ĉiuj vivaj kreaĵoj por ni ĝis nun ne perceptebla? Ĝis nun ni ne scias, kio estas enkodigita en la baza klado (trunko) de DNA, kiu estas al ĉiuj viv-ĉeloj komuna... ni ĉiuj estas eble programitaj al la unusola komuna universa ondo...

Konvinkiva fakto

Plejverŝajne jam estis trovita konvinkiva pruvo pri fakta vero de la sumera rakonto transprenita en la Biblio.

La arĥeologoj *Ron Wyatt* kaj *Jonathan Grey* malkovris en la jaro 1991 en la montpiedo de la monto ARARAT grandegan ŝipon.

Ĝia grandeco kaj la loko de ĝia surlandigo respondas al la biblia priskribo: La loko de la surlandigo estas sur la monto Ararat kiel skribite en Genesis. La dimensioj estas kiel en la Biblio: 150 m longa, 25 m larĝa, 15 m alta. Elektronika sondo trovis sur la flankoj de ĝi regule lokitajn ferajn nitajn, la neeviteblan pruvon de homaj manoj. Ene de la ŝipo malkovris subakva radaro vakajn spacojn kaj dumetrajn pordojn. La etaĝoj estas ligitaj reciproke pere de ramplo descendanta en vastegan koridoron, kiu havas spacojn ĉe siaj ambaŭ flankoj. La ejoj estas sufiĉe grandaj, en ili povis esti instaligitaj ankaŭ grandaj bestoj – sur la radar-fotoj estas rekoneblaj ankaŭ la best-ostoj kaj kornaro.

La esplorkonstruaĵoj estis haltigitaj, ĉar la turka registaro insistas je konstruo de grandega halo, kiu ŝirmus la tutan esplorkonstruaĵon... Sed ĝis nun ne estas la monrimedoj...

<https://www.facebook.com/esperantoprigo>

<http://bulteno.cs-retromusic.net/>

Ŝercoj

Junulo haltigas pli maljunan sinjorinon: „Ĉu vi dirus al mi, avino, kiel mi venu al la hospitalo kiel eble plej baldaŭ?“

„Se vi ankoraŭfoje nomos min avino!“



Juna knabino eniris bestovendejon: „Mi ŝatus aĉeti la kobajeton.“

„Kaj kian kobajeton vi preferas - ĉu belan blankan aŭ tiun belan grizan?“

„Ne gravas, mia serpento ne zorgas pri la koloro!“



Mi parkis aŭton surstrate en Novjorko.

Malinstigi eblajn ŝtelistojn, mi elprenis la aŭtan radion kaj mi lasis surskribon: „Neniu radio, sen valoraĵoj, valizo malplena.“

Matene mi trovis aŭton kun frakasita fenestro kaj al mia surskribo iu skribis, „Nur por esti certa.“



En la aŭtoriparejo: „Ni ne povis ripari viajn bremsojn, do ni almenaŭ instalas pli fortan klaksonon.“



Viro iras en advokatan oficejon kaj demandas: „Kiom vi fakturas?“

La advokato diras: „Kvin mil dolarojn por tri demandoj.“

„Ho ve, tio estas tre multekosta, ĉu ne?“, la viro demandas.

„Jes,“ diras la advokato. „Nun, kia estas via tria demando?“



De kie vi akiris tiun oran horloĝon?

Mi gajnis ĝin en kurkonkurso.

Kiom da homoj partoprenis la kurkonkurson?

Tri: policano, la posedanto de la horloĝo, kaj mi!!!



Policano haltigas aŭtiston malantaŭ la vojkruciĝo: „Vi transiris je la ruĝa lumo! Ĉu vi ne vidis ĝin?“

„Kompreneble mi vidis ĝin, sed mi ne vidis vin!“



Stevardino: „Ĉu estas kuracisto inter la pasaĝeroj?“

Unu el la pasaĝeroj ekstaras kaj iras al la pilotejo. Post iom da tempo li eliras el la pilotejo kaj demandas: „Ĉu estas piloto inter la pasaĝeroj?“

Ŝipo dronas. Kapitano diras al la pasaĝeroj: „Kiu el vi scipovas preĝi?“
„Mi,“ diras unu el la pasaĝeroj fiere.
„Tio estas bona, ĉar unu savveŝto mankas al ni.“



Ŝtelisto rabis la bankon, prenis ostaĝecele du virojn kaj demandis la unuan:
„Ĉu vi vidis min rabi la bankon?“
La viro respondis: „Jes.“ La ŝtelisto mortpafis lin tuj.
Poste li demandis la duan viron: „Ĉu vi ankaŭ vidis min rabi bankon?“;
La viro respondis: „Mi ne vidis vin, sed mia edzino vidis vin. Kaj ŝi diris tion al mia bopatrino!“



Virino iam iris preter vestaĵbutiko kaj vidis belan robon en montrofenestro.
Ŝi eniris kaj demandis la vendistino: „Saluton, ĉu mi povas provi la robon en la montrofenestro?“ Kaj la vendistino respondis: „Certe, sed ankaŭ ni havas provkabinon.“



„Mi ne komprenas, kiel iu povis diveni mian PIN!“
„Kio estis via PIN?“
„La jaro kiam papo Gregorio enkanonigis Domingo de Guzmán la fondinto de la Dominikana Ordeno.“
„Kaj en kiu jaro ĝi estis?“
„En la jaro mil ducent tridek kvar.“



Ŝoforo de longdistanca buso haltis en la parkejo apud la motelo kaj iris al la restoracio. Unu el la pasaĝeroj sekvis lin. Ĉe la drinkejo la ŝoforo tuj mendis plumbrandon. La pasaĝero fulme elprenis la insignon el sia poŝo kaj diris: „Do, sinjoro stiristo, vi ĵus finveturis, polico!“
La ŝoforo fulmrapide diras: „Mi ja scias, ke mi finveturis, sed vi ankaŭ. Min en stirado alternis kolego kaj buso jam daŭras vojaĝon.“



Virino ĉagreniĝas antaŭ la malfermita ŝranko: „Tio estas terura. Mi povas porti nenion. Ĉu vi volas, ke mi iru inter la homojn en tiuj teruraj vestoj?!“
„Kompreneble ne. Ĉu vi scias, kion? Ni iros en bestĝardenon.“



Dialogo inter policano kaj ŝtelisto.
Ŝtelisto portas du valizojn.
Policano: „Kio estas en viaj valizoj?“
Ŝtelisto: „Mi ankoraŭ ne scias, mi ne havis tempon por rigardi.“

Ĝardenisto renkontas amikon.

Ĝardenisto: „Mi bezonas konsilon. Ĉu estas ĝuste meti multan sterkon sur fragojn?” ...

Amiko: „Nu ... mi preferas ilin kun ŝaŭmigita kremo.“



Blondulino telefonas al sia edzo kaj diras: „Saluton, kara, mi havas unu bonan novaĵon kaj unu malbonan novaĵon por vi.“

Edzo: „Mi laboras, karulino, nur diru al mi la bonan novaĵon.“

Blondulino: „Bone. La aersakoj funkciis.“



Sinjoro renkontas Joĉjon kaj demandas lin:

„Knabo, kie loĝas sinjoro Novak?“

Joĉjo: „Iru kun mi, mi montros al vi, sed li loĝas sur la dekunua etaĝo kaj la lifto ne funkcias.“

Do Joĉjo kaj la sinjoro marŝas al la dekunua etaĝo. Sinjoro senspiriĝas kaj Joĉjo diras: „Do sinjoro Novák loĝas ĉi tie, sed se vi volas vidi lin, li sidas ekstere sur benko.“



„Memoru Joĉjo, saĝa homo ĉiam havas dubojn, nur malsaĝulo ne dubas.“

„Paĉjo, ĉu vi certas?“

„Centprocente!“



Du malsataj studentoj sidas en la studenta dormejo, fantaziante: „Ĉu ni komencu bredi porkon?“

La dua diris: „Vi frenezas, ĉu ne? Kion pri la malpuraĵo kaj la malodoro?“

La unua respondas: „Ĝi al kutimiĝos...“



Fine de futbala matĉo ludanto de la venkita teamo venas al la matĉestro kaj demandas lin: „Kiel fartas via hundo, sinjoro matĉestro?“

„Kia hundo, mi ne havas hundon,“ la matĉestro respondas.

La ludanto: „Tio estas stranga. Blinda, kaj ne havas hundon!“



Filino revenas frumatene de la diskoteko, la patrino riproĉas ŝin:

„Ĉu vi ne hontas, kiam mi havis dek ok jarojn...“

„Tiam mi estis kvarjara!“ respondas filino.

Policano trovas monbileton kaj diras al kolego:

„Rigardu, cent kronoj.“

„Ĝi estas falsa, disŝiru ĝin,“ diras kolego.

La policano disŝiras ĝin kaj demandas la alian:

„Kaj kiel vi ekkonis tion?“

„Ĉu vi iam vidis centkronan monbileton kun tri nuloj?“



La paciento demandas ĉe la vizitacio: „Doktoro, do kia malsano ĝi estas?“

„Ni ankoraŭ ne scias, sed nekropsio montros ĝin 100-procente!“
trankviligas lin la kuracisto.



Grupo de turistoj vizitis krokodilan farmon.

Ili estis en sekura kaĝo meze de la lago plena da krokodiloj.

La farmisto sugestis: „Kiu saltos en la akvon kaj sukcesos naĝi ĝis bordo, tiu ricevos milionon da dolaroj“.

La respondo estis nur la surdiga silento...

Subite iu viro saltis en la akvon. Postkurita de voremaj krokodiloj, preskaŭ per superhoma penado, li atingis la bordon sendifekta.

La farmisto donis al li ĉekon por miliono da dolaroj kaj anoncis: „Ni havas gajninton!“

Ricevinte la premion, la viro kaj lia edzino revenis en hotelon.

Jam en la ĉambro la ulo, ankoraŭ streĉita kaj laca, diris al sia edzino:

„Karulino, mi ne saltis memstare... Iu puŝis min en lagon!!!“

La edzino ridetis kaj mistere respondis: „Mi scias, karulo, mi scias...“

La moralajo de la rakonto estas: „Malantaŭ ĉiu sukcesa viro – ĉiam estas virino.“



„Do mi faris teston pri koronaviruso hodiaŭ.“

„Fakte? Kaj kio estis la plej malfacila demando?“

„Ĉu vi estas idioto?“

„Aha. Kaj kion vi respondis al ili?“



Panjo: „Joĉjo, kial vi ploras tiom multe?“

Joĉjo: „Mi sonĝis, ke nia lernejo forbrulis.“

Panjo: „Trankviliĝu, Joĉjo, tio estis nur sonĝo.“

Joĉjo: „Kaj kial vi pensas, ke mi ploras?“

Sinjoro kondukas la bovon per ŝnurego. Kaj la najbaro demandas: „Kien vi iras kun tiu bovo?“ Kaj li respondas: „Nu, mi kondukas ĝin al la herbejo.“ Kaj la najbaro: „Sed mi ne demandis vin.“



„Kia estas diferenco inter modesta kaj avara?“
„Nu, kiam mi aĉetas malmultekostan poŝtelefonon, mi estas modesta. Kiam mi aĉetas ĝin por mia koramikino, mi estas avara!”



„Panjo, ĉu vi memoras tiun vazon, pri kiu vi ĉiam timis, ke ĝi povus rompiĝi?“
„Jes, kaj kia estas la problemo?“
„Nenia... nur ke vi de nun ne plu devas timi.“
Patrino demandas sian filon:
„Tomáš, ĉu vi pensas, ke mi estas bona panjo?“
„Jes, sed mia nomo estas Lukáš.“



Ĵurnalistino de CNN iam estis sciigita pri tre maljuna judo, kiu dum multaj, multaj jaroj ĉiun tagon dufoje preĝadas ĉe la Muro de lamentoj. Kaj ŝi decidis ekscii pli pri tio. Kaj kiam ŝi venis al la Muro de lamentoj, ŝi tuj vidis lin marŝi malrapide per malgrandaj malnovaj ŝtupoj al la sankta loko.

Dum ĉirkaŭ 45 minutoj ŝi atendis, ĝis la maljunulo finos sian preĝon, kaj kiam li turniĝis kaj malrapide, sin apogante per bastono, eliris el la placo, ŝi alpaŝis por intervjui lin.

„Pardonu sinjoro, mi nomiĝas Rebecca Smith, mi estas de CNN. Kia estas via nomo?“

„Moses Feinberg,“ li respondis.

„Diru al mi, sinjoro, kiom da jaroj vi iradas ĉi tien, al la Muro de lamentoj, por preĝi?“

„Jes, jam 70 jarojn, ne malpli.“

„70 jarojn! Ĉi tio estas mirinda! Kaj diru al mi, kion vi petas de Dio?“

„Mi petas pacon inter kristanoj, judoj kaj islamanoj. Ke ne estu militoj kaj malamo inter homoj. Mi preĝas, ke niaj infanoj sekure fariĝu homoj, kiuj amas unu la alian kaj respondecas pri siaj agoj. Mi petas Dion, ke politikistoj ĉiam diru la veron kaj metu interesojn de homoj super la siajn.“

„Kaj kiaj estas viaj sentoj post 70 jaroj da petoj?“

„Kvazaŭ mi parolus en muron.“

*Kompilis kaj tradukis Michal Lebl kaj Mirka Tomečková
(el preparata trilingva kolekto, kiu aperos kiel libro)*

Memoáry Benjamina Kurase

Tomáš Břicháček

Benjamin Kuras využil loňské jarní koronavirové karantény k sepsání čtivých memoárů s názvem *Malá paměť*. Způsobem autorovi vlastním se zde prolíná rozverný i vážný tón. Čtenář se bude chvíli smát a vzápětí zasmušile přemýšlet o krizi naší civilizace.

„Malá“ paměť proto, že nemá jít o ucelenou autobiografii, ale o výběr toho, co se ze života hodí si pamatovat – výběr, který může „časově i tematicky skotačit sem a tam“ a mezi událostmi se propiplávat „autorovou myslí, emocemi, idejemi a bláznivými nápady“. Má to být „ani ne tak psaní o životě, jako psaní o psaní“ neboli o autorově spisovatelské kariéře a o událostech a lidech kolem ní.

Kuras se vrací k hanáckým kořenům, ke studentským letům a spisovatelským i rozhlasovým začátkům. Následují vzpomínky z čínorodých let emigrace, kdy se jeho druhým domovem stala Velká Británie, tehdy stále ještě si zachovávající svoji osobitost a šarm. O práci v BBC, v divadle, o psaní divadelních her, o Londýně, o pozoruhodných lidech i o cestování po Evropě v předmaastrichtské době, „kdy každá země chutnala a voněla jinak“ – o tom všem je tato rozmarná část, ze které číší pohoda i trochu nostalgie.

Váženější tóny pozvolna přicházejí v období po pádu komunismu, kdy se Kuras napůl vrátil do původní vlasti, zatímco druhou nohou zůstával v Londýně. Autor dochází k poznání, že návrat po dlouholeté emigraci neznamená jednoduše příchod domů, ale do jisté míry jde o další emigraci do cizí země.

Po svobodných a nadějeplných devadesátých letech se začalo smrákat. Autor „se začínal trápit obavami o budoucnost civilizované demokratické Evropy a sledoval její postupující ohrožení, sílící eurounijní byrokratizací, islamizací a migrací, na základě odpozorovaných faktů a událostí probíhajících v západní Evropě“. Se vstupem do nového století se pomalu a nenápadně hromadily známky oklešťování svobody a demokracie.

Jako jeden z prvních v naší zemi (mimo jiné spolu s Václavem Klausem) si Kuras všiml nepříznivého pomaastrichtského vývoje evropské integrace a kritizoval jej ještě před naším vstupem do Unie. Už začátkem století hovořil o „upevňování nadnárodních byrokratických kolosů s pravomocemi, které nepodléhají demokratické kontrole a které už evropská voliči nebudou moci změnit“ a později správně pojmenoval podstatu euroústavy, respektive Lisabonské smlouvy.

Ve světle nynějšího obrazoboreckého a klekacího šílenství kolem „Black Lives Matter“, které vygradovalo v době koronavirové pandemie, autor rozvíjí své dlouhodobé téma politické korektnosti, respektive ustupování

nejrůznějším menšinám. Nově pro něj nachází přiléhavý pojem *diverzitokracie*. „Diverzitokracie postupuje přesně podle Orwellova varování, z něhož si udělala recept a stala se přesným opakem toho, co původně znamenala. Místo aby jednotlivé rozdílnosti včleňovala, dělí je na skupinky (též označované jako menšiny), jimiž společnost rozděluje a rozkládá... rozdělila společnost podle staré osvědčené marxistické šablony na skupiny (čili identity) ohrožované, a proto hodné ochrany oproti skupinám (čili identitám) neohrožovaným, a tudíž ne-li přímo ohrožujícím ty ohrožované, tak přinejmenším se nacházejících v postavení, z něhož ty ohrožované ohrožovat mohou. ... Skupiny ohrožovaných se ... stávají skupinami privilegovanými, se zvláštními právy bez příslušných povinností, zatímco skupiny klasifikované jako neohrožované se dostávají do postavení méněcenného, se zvláštními povinnostmi bez příslušných práv.“

Podle Kurase anglosaská civilizace, která vždy bývala racionální, pragmatickou a humánní záchranou světa před řáděním diktatur, sama zešílela a samotnou svou vahou by mohla strhnout svět do chaosu. V tomto světě se skoro jako jediný ostrůvek rozumu, klidných emocí a politické stability jeví střední Evropa.

„Má-li z této pandemie a pandemonie vzejít nějaká renesance, ve Střední Evropě k tomu má šanci největší, ne-li jedinou. Společné vybudování politické archy, která by potopou bezpečně proplula, je možná sen příliš optimistický. Realističtější nadějí je aspoň vytváření individuálních morálních skafandrů.“

Tyto skafandry by se musely sešívát ze základních civilizačních principů, jako jsou tyto: „Na každé negativum se dá nalézt pozitivní přístup vytvářející nové příležitosti. / Aby bylo vzdělání k něčemu užitečné, musí se zbavit ideologického balastu a soustředit se, podle Komenského, na osvojování praktických dovedností vytvářejících hmotné i duchovní bohatství a na pěstování charakteru. / Charakter i praktické dovednosti se pěstují překonáváním překážek a osvojováním pracovní kázně, touhy po vědění, radosti z dozvídání, vášně k tvoření a úsilí o skvělost. / Svoboda se musí denně praktikovat a bránit, aby nezanikla. / Práva nemohou existovat bez povinností. / Když k tomu necvičíme děti od malička, děláme z nich lemply, ničíme jim život a ohrožujeme ostatní.“

Kurasova *Malá paměť* je barvitým souborem humoru, životních zkušeností i hlubších myšlenek a podnětů. Ve svém střídání tónů a nálad čtenáře pobaví, rozesměje, ale místy i zamrazí a vede k neradostným úvahám. Optimistické momenty ale jasně převažují a čtenářovy retní koutky by měly po dočtení závěrečných řádků zůstat v pozvednuté pozici. V každém případě jde o knížku, kterou stojí za to číst, a to s tužkou v ruce.



B U L T E N O
de Esperantista Klubo en Prago
Časopis Klubu esperantistů v Praze
Redaktor: Tomáš Břicháček

Vydavatel:

Klub esperantistů v Praze

pobočný spolek Českého esperantského svazu, z. s.

IČO 66004322

C/o Jiří Mišurec

Jirečkova 5

170 00 Praha 7